# *Prezidento de Kubo ?eestas ceremonion por la remalfermo de la lerneja jaro*



**Malferma ceremonio de la lernojaro en Kubo, novembro 15a, 2021.**

Havano,  nov 15 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, gvidis ?i-lunde en Havano la centran akton por la remalfermo de la lerneja jaro por bazlernejanoj.

La eminentulo frekventis la bazlernejon Pedro Domingo Murillo en la Lerneja Urbo  Libertad, kie studas ?irka? 490 studentoj de la pli ol 700,000 kiuj revenas al klas?ambroj tra la lando.

La ministrino pri edukado, Ena Elsa Velázquez, la hispana europarlamentano Manu Pineda kaj aliaj ekzekutivoj, akompanas la prezidenton.

La estrino de Edukado emfazis, ke la defioj estas pli grandaj en ?i tiu rekomenco de la lerneja jaro, ?ar instruistoj devas pli multe klopodi por servi siajn lernantojn kaj sistemigi edukajn enhavojn.

Anta?e, la ministrino klarigis, ke ?irka? 1,7 milionoj da studentoj jam estas en 10,754 edukaj institucioj en la lando. El ili, pli ol 90%  rekomencis la kurson vakcinita per la imunogenoj de nacia produktado.

En nacia televido, Velázquez emfazis, ke el ?iuj centroj de la lando oni ricevis raportojn pri la alveno de la studentoj kun ?ojo, trankvilo kaj konfido.

"?i estas vera festo," diris la estrino dum instigas instruistojn kaj studentojn respekti la higienian-sanajn regulojn en ?iu lernejo.

Momentojn anta?e, Díaz-Canel emfazis la nacian ?ojon pro la ali?o de studentoj en klasoj, la rekomenco de internaciaj flugoj kaj la remalfermo de kulturaj, sociaj kaj ekonomiaj spacoj.

La prezidento dividis per sia persona konto en Tvitero fotojn, kiuj spegulas la festojn en la kariba nacio.

Siaflanke, la kuba ministro pri eksteraj aferoj, Bruno Rodríguez, anka? emfazis en Tvitero, ke la nova normaleco "redonas al ni la longe atenditan ?iutagan vivon. Kun novaj revoj kaj celoj #CubaVive malfermi?as al la mondo kaj renaski?as."

Fonto: Prensa Latina

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/277170-prezidento-de-kubo-ceestas-ceremonion-por-la-remalfermo-de-la-lerneja-jaro

Radio Habana Cuba